



Norvega Esperantisto

E S P E R A N T O B L A D E T

N-ro 4
1974

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
Redaktoro: Hans Amund Rosbach

3-a periodo
41.a (50-a) jaro
Dumonata

Nia plej grava tasko?

La prezidanto de Skolta Esperanto Ligo skribis en «La Skolta Mondo» artikolon sub titolo «La Prezidanto revas». En tiu li, s-ro Berggreen, atentigis pri la tre granda nombro de skoltoj. 20 milionoj geknaboj en 104 landoj apartenas al la skolta movado. Kaj li revas: «Kio okazus... eĉ se nur 1 % de la skoltoj interesiĝus pri La Internacia Lingvo?»

Venontsomere okazos — en Norvegujo! — la plej granda evento de la skolta mondo, la mond-ĵamboreo. Skolta Esperanto Ligo celkonscie laboras por eluzi ĉiujn eblecojn, ke esperantoparolantaj skoltoj renkontiĝu, kaj per tiu renkonto pruvu al la aliaj skoltoj la taŭgecon kaj avantaĝojn de La Internacia Lingvo.

El ĉiu norvega skoltknaba trupo povos iri al la ĵamboreo unu skolto. Tiu skolto kompreneble estas elektata inter la plej diligentaj, li ne estas



novulo, sed trapasis gradojn kaj havas sciojn. Same venos el Svedujo kaj Danujo — la du aliaj gastigantaj landoj — po unu skolto el ĉiu trupo.

Kaj jen: Kio okazus, se almenaŭ tiuj skoltoj estus pretaj renkonti la eksterlandajn esperantoparolantajn skoltojn? Ni scias, ke tiaj alvenos. Oni organizos eblecojn trovi unu la alian.

La esperantokluboj certe devas organizi esperantokursojn por havi novajn membrojn. Sed ĉu ne tio estas la plej simpla, celkonciza, racia, efektiva celo de niaj provoj: Varbi tiun ĉi skolton, kiu iros al la ĵamboreo, kune kun kelkaj liaj amikoj?

Nia artikolo pri Skolta Esperanto Ligo montros punktojn al kiuj la propagando povas ligiĝi — al prospero de la skoltismo. Ĉar, eĉ se ni celas la bonon de nia klubo, de nia Ligo kaj de nia movado, ni proponu helpon al la realigo de la skoltaĵoj.

Sciigoj de N.E.L.

La aŭtuna laboro. Komenciĝas jam nova laborsezono. La ĉefa tasko de ĉiuj kluboj kaj membroj nun estas starigo de kursoj por krei novajn esperantistojn. Se en iu loko neniu esperantisto povas gvidi kurson, oni kolektu la interesigantojn en studrodo, kiu povas lerni per la koresponda kurso. Oni ankaŭ klopodu igi iun gazeton publikigi la gazetan kurson, kiu nun estas havebla kaj en matricoj kaj por ofsetpresado (skribu al N. E. L. pri regularo kaj provleciono). Vidu ankaŭ la pasintan numeron de Norvega Esperantisto.

Taskotabelo por kluboj. — *Oktobro:* La kluboj aranĝas kunvenojn por ĉiuj esperantistoj en la loko (ĉiuj, kiuj iam partoprenis kurson), laŭeble oni sendu inviton al ĉiu unuope. La kunveno estu planita kun la celo (re-)membrigi ilin. Ĉirkaŭ la 24a de Oktobro ĉiuj kluboj aranĝas kunvenon dediĉitan al la Tago de U.N.O. — La kasisto sendas al N.E.L. (kaj al la distrikto) kotizojn kaj liston de novaj membroj kaj de eventualaj malfrue pagintaj malnovaj membroj. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

Raporto de la Liga Estraro pri la 2a jarkvarono. Okazis du estrarkunvenoj, kaj oni elsendis unu cirkuleron. La tuta biblioteko estas nun kolektita en Nedre Slottsgt. 3, kie Stefan Murak kaj Tom Arbo Høeg laboras pri ĝia ordigo. La Faksekcio de Instruistoj elektis estraron (prez.: Elna Matland) kaj aliĝis al I.L.E.I. Britan proponon pri komuna gazeto «Eŭropa Esperantisto» oni diskutis, sed trovis ĝin neaktuala por nia lando. — Ludvig Anjer estas reelektita kiel Komitatano A de U. E. A.; C. Støp-Bowitz estas elektita kiel salutonto de N. E. L. en la 59a Universala Kongreso en Hamburgo; R. Bugge-Paulsen estas nomita salutonto de la Registaro. N.E.L. estis reprezentata per 255 voĉoj en la ĝenerala kunveno de Eldonejo Esperanto A/S. Kiel Agado «Publikaj Rilatoj» informcirkulero estis sendata al aŭtoritatuloj kaj al diversaj organizaĵoj.

La Liga Estraro

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Provizora redaktoro:

Hans Amund Rosbach
Johan Hammond Rosbach

Adreso de la redakcio:

Nergt. 37 c, 6500 Kristiansund N
(Limdato por manuskriptoj: la 20.
en la monato antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 12,—.

Anonprezoj: 1/1 p. kr. 150, 1/2 p. kr. 75,
1/4 p. kr. 40, 1/8 p. kr. 20.

Ĉu vi konas?

Vi estas membro de Norvega Esperantista Ligo. Eble vi ankaŭ apartenas al alia esperantoligo — ekzistas ja multaj. Se vi estas individua membro de U.E.A., vi konas tiujn el la Jarlibro, kiu havas mallongan prezenton de ĉiu el tiuj fakasocioj. Sed multaj el vi verŝajne ne konas pli ol unu, eble du, al kiuj vi mem apartenas. Kaj ne scias, ke ankaŭ alia intereso-sfero estas reprezentata inter la fakligoj, kaj eble nur atendas je via membriĝo por ekflori kaj prosperi, por doni al vi eblecojn doni informon inter viaj kolegoj kaj amikoj.

Ni decidis fari mallongan prezenton de kelkaj tiaj ligoj en nia revuo, kaj komencas — pro la evento pri kiu informas la unua paĝo — per Skolta Esperanto Ligo. Ĉu vi konas ĝin? Ĉu eble vi konas alian, kiun vi mem deziras prezenti tra N. E. ? Do, bonvenon.

Haro

La kontorfondado

Pli frue	kr. 1090,20
R. Bugge-Paulsen	» 30,00
Aase Haube Nielsen	» 30,00
Signe Korstvedt	» 20,00
C.S.B.	» 30,00
O. Rygg	» 4,00
E. A. Utne	» 10,00
H. Danielsen	» 18,00
	<u>kr. 1232,20</u>

Kampanjo Reisæter

Pli frue	kr. 900,00
J. Berggreen	» 100,00
Leif H. Bryn	» 100,00
Reidar Lindstrøm	» 100,00
Aslaug Karterud	» 100,00
Otto Prytz	» 300,00
Trygve Reisæter	» 100,00
	<u>kr. 1700,00</u>

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

Membro subtenanta 1974

John Selbekk

†

Mimi Jørgensen forpasis.

La 19an de Julio forpasis en Oslo f-ino Mimi Jørgensen, unu el niaj plej malnovaj pioniroj. Ŝi estis fidela membro de Klubo Esperantista en Oslo, kies agadon ŝi ofte kaj malavare subtenadis.

Pacon al ŝia memoro.

C.S.B.

Informoj de la Ekzamena Komisiono

Ekzamenoj plenumitaj. Dum Majo-Junio 1974 elementan ekzamenon en Oslo sukcese plenumis Willy Gjertsen, Margrete Landmark.

Ordinaraj aŭtunaj ekzamenoj. — Ekzamenoj okazos ĉirkaŭ la 1-a de Decembro 1974. Instruistan ekzamenon oni povos fari en Oslo, superan kaj elementan ekzamenojn en Oslo, Bergen, Haugesund, Sarpsborg, Sunda kaj Trondhejmo (la ekzamena komitato en Tromsø provizore ne funkcias). Oni anoncu sin per la skemoj riceveblaj de la lokaj ekzamenaj komitatoj aŭ rekte de la Ekzamena Komisiono. Oni sendu la skemojn al tiu komitato, ĉe kiu oni intencas fari la ekzamenon, antaŭ la 1-a de Novembro. Personoj, kiuj faros ekzamenon ne en Oslo, plenigu po 2 — du — skemojn. *Plenigu la skemojn precize kaj komplete!* — *Aliĝoj, kiuj alvenos post la 1-a de Novembro, ne estos konsiderataj.*

Jenaj helpiloj por sinpreparado al ekzamenoj estas aĉeteblaj ĉe la Ekzamena Komisiono, Boks 942, Oslo 1, poŝtĝirokonto 1.00.34.

Ekzercaj taskaroj: Kajero I: traduktaskoj por elementa ekzameno. Kajero II: diktajoj por elementa ekzameno. Kajero III: traduktaskoj por supera ekzameno kaj taskoj por instruista ekzameno. — Prezo por unu kajero: kr. 1,00 + afranko.

Vortlisto por Adi: La Forto de P' Vero, kr. 0,50 + afranko.

Ekzamena Regularo kun ekzamenaj programoj kaj konsiloj pri lernolibroj kaj literaturo, kr. 0,50 + afranko.

Notu ke ĉi tiujn helpilojn oni aĉetas ĉe la Ekzamena Komisiono.

EKZAMENA KOMISIONO DE N.E.L.

C. Støp-Bowitz
prezidanto

La taskoj por elementa ekzameno en Majo 1974 estis:

TRADUKAĴO

Haiene (1) var borte.

Etter en lang og varm reise ankret skipet opp utenfor *utløpet* (2) av en flod i Sumatra. *Besetningen* (3) trengte en forfriskning og hadde god lyst til å bade (*seg*). Men de var veldig redde for *haiene*. Det kom en del *innfødte* (4) til skipet for å handle (5). En sjømann spurte derfor en av de *innfødte*: «Er det *hai*er i sjøen her?» — «Ingen *hai*er,» svarte han. Deretter badet *besetningen* i det lunkne vannet. Da de kom opp på skipet igjen, spurte en av dem den *innfødte*: «Hvorfor er det ingen *hai*er her?» «Altfor mange *krokodiller*,» forklarte den *innfødte*.

- 1) hai = ŝarko
- 2) sammens. av *flui* = renne, flyte
- 3) sammensettes av *ŝipo* = skip
- 4) *innfødt* = indiĝeno
- 5) handle — fari negocojn

DIKTAĴO

La akuzo. (1)

Hilde volis disiĝi de sia edzo, kaj ŝi deziris ricevi kiom eble plej grandan *infansubtenon*. Ŝi vizitis advokaton, kiu klarigis al ŝi, ke ŝi almenaŭ devas havi ian akuzon kontraŭ la edzo.

JUBILEOJ

Henry Fridén 70-jara

La 27-an de aŭgusto fariĝas 70-jara Henry Fridén, Halden. Fridén estas prezidanto kaj fajrero de la haldena klubo *Ascendo*. Ni ankaŭ bone konas lin el la kolonoj de Norvega Esperantisto, kie li ĉiam estis fervora kaj ŝatata kunlaboranto. Plurfoje li gajnis premiojn en la poezia branĉo de la internaciaj literaturaj konkursoj de Universala Esperanto-Asocio. Entute la poezio estas proksima al lia koro, kaj tio, kion li ne scias pri metriko kaj rimarto ne valoras penon lerni. Tio certe havas konekson kun lia muzika menso. Ĉar lia dua granda intereso estas la muziko. Li estas dum jaroj prezidanto de la simfonia orkestro en Halden, kaj li mem estas lerta violonisto. Ni menciuj ankaŭ, ke li seninstruiste lernis plurajn lingvojn kaj faris gramatikajn kaj vortarajn komparojn, kiuj estas dignaj de faka lingvisto. Kaj kiam ni aldonas, ke li estas gastama kaj afabla homo, ni kompletigas la bildon pri la jubileulo, kiun ni kore gratulas.

JHR.

Erling Anker Haugen 65-jara

E.A.H. — kio estas lia ne nekonata signaturo — fariĝis esperantisto jam en 1925, kaj post tio li estis aktiva kaj fervora membro de grupo, nacia ligo kaj internacia movado. Sed lia plej granda kaj grava signifo por nia lingvo estas sur la literatura flanko. Ke lia traduko de «Brand» baldaŭ aperos, ĉiu literaturamanto ja esper-

«Ĉu vi ricevas monon por la mastrumado?» la advokato demandis.

«Jes certe,» Hilde respondis.

«Nu, sed eble li drinkas?»

«Okazas, ke li aĉetas duonbotelon, kaj tiam ni trinkas iom da viskio kun sod-akvo. Sed tio ja ne estas drinki?»

«Ne,» *koncedis* la advokato, kaj kaptis la lastan ŝancon: «Eble via edzo estas malfidela?»

«Jes, tion mi devas diri, sinjoro advokato, ke patro de la lasta infano, tio li almenaŭ ne estas.»

akuzi = anklage

sub-teni = underholde, understøtte

koncedi = innrømme

Reviviĝis U. L.

Multaj esperantistoj memoris la flugfoliojn, la membrokartojn, la novan «monon» la steloj, la kontribuajn brikojn k.t.p. kaj la optimismon ligitan al Universala Ligo. «Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali...» Jes, kaj la celo estis la bela: Unu komunan mondon. Sed iom post iom, ŝajne, la tuta ligo malsaniĝis, velkis, mortis. La Praktiko ne plu estas organo de Universala Ligo, la financoj estis ĥaosaj, kaj ni informiĝis pri malsaniĝo de s-ro Andreo Cseh.

Sed nun, subite, aperas denove presajoj de U. L. Tre modestaj, certe, sed ŝajne kun vivforto kaj espero. Jam aperis du numeroj de bele multobligita (ofseto) revuo kun informoj pri adreso (Postbus 334, NL 1351 Bussum, Nederlando), pri ĝirokontoj kaj banko, pri provizora estraro, pri nova aktiveco. — Jarkunveno okazos novembre en Nederlando.

Recenzoj

LITERATURO POLITIKA

Noveloj de Lusin. Plena kolekto. Fremdlingva Eldonejo, Pekino 1974. 488-paĝa, bindita, ilustrita.

Ni ŝajne estas en la jaro de reeldonoj. Antaŭ 11 jaroj Ĉina Esperanto Ligo eldonis la binditan eldonon «Noveloj de Lusin», kaj nun ree ĝi kuŝas sur nia tablo. Sed la nova, «plena kolekto» enhavas 4 pluajn novelojn el la kolekto «Malnovaj legendoj nove redaktitaj». Dum la dek unu jaroj ni travivis evoluon en nia mondkoncepto La plej granda «Literaturhistorio de la Mondo» kiun mi tiam konsultis, eĉ ne enhavis la nomon de Lusin — ĉar la «mondo» al eŭropanoj estis la landoj, en kiuj iu eŭropa lingvo estas parolata. Nun tamen, ni konsideras ankaŭ la ne-evoluintaj landoj parton de la mondo, kaj des pli malnova kulturlando kia Ĉinujo. Kaj ni povas en la literaturhistorio legi pri Lusin, la studento de medicino, kiu dum la studo en Japanujo komprenis, ke li povas fari pli grandan utilon al sia lando per literaturo — literaturo kun klara politika fono. Kaj jen li en la jaro 1906 forlasis la studojn por ini-

as, kaj — kompreneble — pleje tiuj, kiuj jam legis lian majstran tradukon de Peer Gynt plurfoje. La eldono de tiu libro certe estus la plej bona donaco kiun E.A.H. povus ricevi kombine kun la jubileo. La jubilea tago estis la 11-a de aŭgusto, kaj ni postfeste gratulas.

ciati literaturan movadon. Poste li dediĉis sian vivon al la literaturo, politiko kaj instruo (kiel lektoro de Pekina Altgrada Lernejo kaj de la Esperanta Faka Lernejo). Liaj noveloj do havas klaran politikan tendencan, sed kiel ĉe aliaj grandaj verkistoj, tio neniel ĝenas aŭ donas al liaj noveloj malavantaĝojn, kaj kiam la ĉinoj konsideras lin fondinto de la moderna ĉina literaturo, ni povas nur akcepti la fakton. Kaj kun plezuro ni legas la novelojn. Unu malgranda punkto por kritiki: En la nova eldono mankas la nomo de la tradukinto de ĉiu opa novelo, indikita en la unua eldono. Kompreneble mi ne konas la nomojn de tiuj ĉinoj, tamen ili — laŭ mia opinio — devas havi tiun honoron. Merititan!

Haro.

RELIGIA POLITIKO

Heroaj Fratinetoj sur la Stepo. Porinfana bildlibro eldonita de Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1974.

Kiel la multaj jam eldonitaj bildlibroj el Ĉinio, ankaŭ tiu ĉi estas bela kaj kun facila teksto kaj sufiĉe interesa enhavo, tiel ke infanoj certe ĝuas la libron. Temas pri du fratinoj, kiuj per eksterordinara heroa sinteno savis la ŝafaron de kolektivo en la interna Mongolio. Sed pli ol ordinare tiu ĉi libro montras, ke la regado de prezidanto Maŭ ne estas politika, sed fakte pure religia. «Prezidanto Maŭ estas granda savanto de diversaj naciecoj de nia lando, orientante nian antaŭeniron. Ni devas ĉiam aŭskulti liajn vortojn.» — «Vere bonaj infanoj de Prezidanto Maŭ!» Tiaj kaj aliaj

frazoj kune kun la bildoj klare montras la adoradon de Maŭ. Pretervidante tion, ni trovas la libron bona, sed eble pro tio vere efektiva propagandilo.

R.

RELIGIA BROŝURETO

Jacobo Lorber: La Korespondado de Jezuo. Eld. Josef Eder, Aŭstr.

Josef Eder, Graz, esperantigis ĉi tiun kajeron, kiu laŭ la antaŭvorto enhavas la koncizan instruon de Jezuo Kristo, kaj kiu estis «revelaciita al la homaro pere de la 'skribisto de Dio', Jacobo Lorber.»

Temas pri sep «leteroj» de Abgaro Ukamo, princo de Edeso, al Jezuo, kaj ties respondoj al li. Se tiuj leteroj estus aŭtentikaj, ili kompreneble estus plej valoraj, sed kiaj ili nun aperas — kiel dokumento de la «novrevelacio de Lorber», kies fakdelegito s-ro Eder estas — ili apenaŭ estas pli ol bela revo, kaj donas al ni ne pli aŭ malpli ol mallonga prediko: t. e. eblecon mem pripensi kion Dio volas.

S-ro Eder sendas la broŝuron kontraŭ 3 respondkuponoj + sendspezoj.

Emulo.

NOVA BROŝURO POR ĈIUJ AKTIVULOJ

Sub la titolo «Por pli efika informado» ĵus aperis nova eldonaĵo de la Informa Fako de Universala Esperanto-Asocio kun praktikaj konsiloj por ĉiuj, kiuj aktive laboras sur tiu kampo. Samtempe ĝi povas servi kiel gvidlibreto por tiuj, kiuj volonte helpus informadi la publikon pri Esperanto, sed kiuj pro manko de sperto

hezitas tion fari. La 20-paĝan ilustritan broŝuron verkis la prezidanto de UEA, prof. Ivo Lapenna. Ĝia prezo estas ĉ. 5 kr.

La aŭtoro mem organizis sisteme la Informan Fakon de UEA en ĝia nuna formo kaj, kiel ĝenerala sekretario ĝis 1964, estis dum multaj jaroj ĝia gvidanto. Estas li tiu, kiu kunmetis la konatan Principaron de Internacia Lingvo (la «Principaron de Frostavallen»), kaj ĉi tiu artikolserio, represita el la revuo «Esperanto», kvazaŭe kompletigas la Principaron, resumante liajn spertojn kaj aldonante abundajn praktikajn ekzemplojn kaj konsilojn. Kiel honorofica direktoro de CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo) li organizis kaj plue gvidas la laboron de tiu institucio.

La verkon ilustras 14 bildoj pri diversaj aspektoj de la informa laboro. Kompletigas ĝin modernaspekta dukolora kovrilo. Formato: 222 × 167 mm. Rabato por revendistoj: 1/3 ekde 3 ekzempleroj.

15a Eŭropa Feriosemajno en Svisio (EFS)

Ĝi estos aranĝata de la Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj (SAEF) kaj okazos 22an—28an septembro 1974 en Magliaso ĉe la bordo de la Lugan lago — 10 km okcidente de Lugano. Diversgradaj Esperantolecionoj, ekskursoj, distraj vesperaj aranĝoj. Petu pri informoj kaj sendu aliĝigon al: S-ro Ernst Glättli, SAEF-sekretario, Laurstrasse 17, CH-5200 BRUGG — SVISIO.

Totala fiasko

En pluraj numeroj de nia gazeto ni publikigis serian konkurson kun bildoj. La respondoj ne estis multaj, kaj pli ol 85 % el tiuj malmultaj respondoj venis el ekster Norvegujo. Ni tial devas konstati, ke tiu konkurso tute ne interesis la norvegajn legantojn, kiuj ankaŭ ne faris ion por la celo de la aranĝo: fortigo de la ekonomio de Norv. Esperantisto. Tamen unu sola escepto ekzistas, la nomo estas Kirsten Ek, Oslo. Ŝi partoprenis ĉiujn partojn de la serio, kaj ni ne bezonas lotumadon por scii, kiu ricevi la premion, kiu estas skatolo da forkoj.

Ekster la kadro de la paĝoj

Alia konkurso okazis dum la printempa sezono. Temas pri aranĝo ekster la kadro de la paĝoj, t.e. per cirkulera letero. Ni faris mapon kun partoj de Norvegujo, Svedujo kaj Danujo, kaj petis la ricevantojn surmeti kelkajn urb-ojn, pri kiuj ili samtempe ricevis liston. La cirkulero iris i.a. al ĉiuj norvegaj delegitoj. Oni devis ĉeigi 5 kr. kun la respondo. Iom pli ol 20% reagis, kaj ni dankas ilin. Iliaj kontribuoj kovris la elspezojn por papero, afranko kaj premio — kaj iomete pli, sed ne tiom, ke oni estus povinta pagi la farinton de la konkurso ckz. 5 kr. por unuhora laboro. La premion, skatolon da forkoj, ricevis D-ro C. Støp-Bowitz, Oslo.

Paŭl' sur la kampo

Norvega kanzono el Gudbrandsdal

Paŭl siajn kokojn sur kampon ellasis,
flugis kokinoj facile trans fost'.
Paŭl povis bone laŭ ili percepti,
ke vulp' ĉirkaŭkuris kun longa la vost'.
:/: Kluk, kluk, kluk, kokino akordis. :/
Paŭl ĉirkaŭkuris, okulojn li tordis:
«Nun ne kuraĝas mi reveni al panj'»

Paŭlo nun iris pli longen en kampo;
jen ekaperis la vulp' kun kokin'.
Paŭlo ekprenis tuj ŝtonon en mano,
forte li trafis la vulpon per ĝi!
:/: Vulp' kuris for, la voston ĝi levis, :/
kokinon li perdis, nun plori li devis:
«Nun ne kuraĝas mi reveni al panj'»

Se havus mi bekon, kaj havus mi ungojn
kaj sciuss mi nur, kie estas ĝi nun,
gratus kaj unĝus mi ĝin ja komplete,
ek de la kapo ĝis vosta ruĝbrun'.
:/: «Hont' al ĉiuj la vulpoj ruĝfelaj :/
donu, ke ili nun kuŝu morthelaj,
tiam mi povus ja reveni al panj'»

Ne povas ŝi ovi, ne povas ŝi kluki,
ne povas ŝi rampi, nek iri, oj, oj!
Nun devas mi iri al grenmuelejo
por fari farunon perditan sur voj'.
:/: Pa, diris Paŭl, ne estu ni stultaj, :/
buŝ' kaj kuraĝo jam helpis al multaj;
nun mi ja certe povas iri al panj'»

Paŭlo la grenon rapide muelis,
tiel ke eĥis en ĉiu angul'.
Ĉiuj grenspikoj ĉirkaŭe disflugis
estis pli longaj ol lano de mul'.
:/: Paŭl ekridis kaj henis sen fino :/
jen rekompenco por ov' kaj kokino.
«Nun mi tute certe povas iri al panj'»

Trad. H. Fridén.

«LA STULTA HOMO»

Redaktoro Halvor Diesen

La franca profesoro kaj Nobel-premiito en medicino Charles Richet skribis iam libron, kiun li nomis «L'homme stupide». Kontraŭe al la nocio «Homo sapiens» (La saĝa homo) Richet operaciis per «Homo stultus» (La stulta homo), kaj li mencias la kaŭzojn por tio.

Unue sur la listo staras la milito kaj poste, sed ne malpli grava, nia timo pro la morto. Inter tiuj du staras nun: la alkoholismo, inkluzive la stultajon lasi la bonajn vinberojn esti distrampolitaj de eble vundaj, infektitaj piedoj de malpuraj kamparanoj; la respekto por reĝeco, aristokratio kaj plutokratio kaj entute tiaj diferencoj inter homoj, kiuj ne estas nature kondiĉitaj. Plue dogano, ĉaso, elhakado de arbaroj, persekuto al grandaj viroj kiel Sokrato, Jesuo kaj aliaj, portado de juveloj, la kontraŭstaro al la *mond-lingvo Esperanto*, kredo al religiaj mitoj, la ceremonioj pri la korpoj de la mortintoj, la kutimo turmenti tiujn kiuj sendube estas mortantaj, tenante ilin vivaj anstataŭ doni al ili morfinon lasante ilin feliĉe endormiĝi; kaj ankoraŭ multaj aferoj.

La du ekstremajoj ĉe profesoro Richet ne postulas klarigon. La homoj scias, ke milito nur kondukas al mizereco, kaj timon pro la morto ili ne bezonus havi, sciante ke ĝi venos pli aŭ malpli frue. Sed la formulado de la ceteraj stultajoj eble volas iom aliĝi pro la ŝanĝo de la generacioj.

Anstataŭ la malpurema traktado de vinberoj ni verŝajne hodiaŭ skribus:

ĉia nesanita traktado de nutriloj aŭ inventado de sintezaj nutraĵoj. Adoradon al reĝeco k.t.p. ni eble hodiaŭ substituus per burokrateco. Kiam Richet mencias ĉason kaj elhakadon de la arbaroj, tiam li tuŝas la elrabadon de la naturriĉaĵoj de nia tempo, la malkovron de la ekologiaj leĝoj k.t.p. Persekutado al famaj personoj ankoraŭ estas aktuala, komparu Solŝenicyn. La kutimon porti juvelojn oni hodiaŭ povas anstataŭi per ĉia vanteco. La kredo al religiaj mitoj kaj ceremonioj ĉirkaŭ la korpoj de la mortintoj estas tiel persone stampitaj aferoj, ke ili apenaŭ ĝenerale volas esti konsiderataj «stultajoj». Kiam Richet entute ilin kunprenas en tiu ĉi konekto, tio verŝajne estas ŝuldata al lia propra absoluta senreligiigo. Kaj la problemoj ĉu oni entute devus helpi al senespere malsanaj personoj endormiĝi, ankoraŭ estas diskutata temo. Sed venis novaj aferoj al la listo de Richet, kiel la rangaj simboloj de la bonstata socio k.t.p., kvankam tio eble venus kiel subfako al la vanteco.

Kie Richet metus «jukeboxojn» kaj diskotekojn estas necerte, sed narkomanio certe estas tiu parto de alkoholismo, perforto kaj teroro kiu apartenas al la milito.


Ne, «Homo sapiens» certe ankoraŭ estas esprimo de dezirpensado, kreita de bonvolaj animoj. Ankoraŭ regas «Homo stultus», kaj ni verŝajne havos tion kiel labortaskon ankoraŭ dum vasta tempo venonta.

Tradukis el «Moss Dagblad» HENRY FRIDÉN

FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO — NEFA

Kaldbakkstubben 22, Oslo 9
Redaktoro: Odd Kolbrek



Memorigo pri la epoko kiam la vaporo estis reĝo

En Nov-Zelanda Philatelic Bulletin (Filatelia bulteno) nr. 9 1973 aperis artikolo pri malnovaj vaporlok. kun 4 bildoj de poŝtmarkoj kun vaporlok. kiel motivo. La spaco en «Ferv. Paĝo» ne permesas aperigi bildojn de la markoj, kaj mi devis mallongigi la artikolon, kiun Kåre Bye tradukis, i. a. la detalan priskribon pri la lok. tipoj. (Rimarko de la red.)

Ek de 26/12 1971 en la ĉeflinioj de Nov-Zelandaj Fervojoj ne plu aplikigas vaporlok., kaj finiĝis epoko en la tiea fervoja historio. Tamen ĉi-jare (1973) oni intencas ekveturigi turisttraĵojn ekde novjaro ĝis la Pasko kun la menciitaj lok. laŭ la distanco Lumsden—Kingston ĉe la lago Wakatipu en la Suda Insulo. Nun la poŝto eldonis 4 memorigmarkojn por agnoski la kontribuojn de ĉi tiuj ferĉevaloj por la evoluado de Nov-Zelando kiel nacio. Ĉi tiuj lok. propramaniere formis la bazon por la evoluo de la gigantaj dizel-elektraj lok., kiuj nuntempe trafikas la proks. 490 milojn longan fervojreton.

La unua konstruado de lok. ne bone sukcesis. La indiĝenoj - la maorioj -

nomis ilin i. a. «Pakeha ĉevalo» («Pakeha» estas maoria vorto por eŭropano). En 1889 oni komencis konstrui bonstrukturajn lok., tipo «W», kiu funkciigis ĝis la fino de 1950. Escepte de i. a. elektraj ĉeflampoj kaj pneŭmatikaj bremsoj la «W»lok. preskaŭ ne ŝanĝiĝis dum la lastaj 70 jaroj.

La konstruado de vaporlok. atingis sian kulminan punkton per la brila kaj bele konstruita tipo «Ja». Kvin el tiuj multflankaj lok. konstruigis ĉe Hillside ripardejo en Dunedin kaj estis la lastaj, kiuj konstruiĝis por la Nov-Zelandaj Fervojoj. La «Ja»-tipo, konstruita en Hillside de 1946 ĝis 1956, fariĝis la plej grava ĉefapogo al la fervoja sistemo en la Suda Insulo, kaj ĉiutage ili estis ordinara vidaĵo inter Christchurch kaj Invercargill en la Suda Insulo. La «Ja»-tipo estis ekipita per kruckunmetitaj aerkunpremigiloj kaj la plej multaj el ili havis rullagroj. Ĉi tiu ekipaĵo de rullagroj ebligis pli longtempan veturadon inter la ĉefrezervoj.

La «Ja»-lok. estis la lastaj, kiujn oni vidis ĉe la Nov-Zelandaj Fervojoj, almenaŭ ĉe la ĉeflinioj. La bruado

Norvega Kronika

OKCIDENTA DISTRIKTO

La Okcidenta Distrikto de N. E. L. jarkunvenis en Ullensvang Gjestheim sabate kaj dimanĉe la 25an kaj 26an de majo. Alvenis esperantistoj de Bergen, Haugesund, Oslo, Odda kaj Sauda, entute ĉirkaŭ 35 personoj.

Sabatvespere, post bongusta tagmanĝo, ni kunestis en la salono por partopreni en pli vigla kaj distra programo. Johan Matland montris siajn serĉaĵojn, tre bone montratajn, kaj Kristian Sivertsen laŭtlegis memfaritajn poemojn, kiuj estis tre bonaj. Poste ni kantis, babiladis kaj dancis.

Dimanĉe je la 10a horo komencis la pli serioza programo, kiu estis gvidata de la prezidanto Elna Matland. Ŝi komencis per legi raporton pri la laboro de la Okcidenta Distrikto dum la tempo majo 1972 ĝis majo 1974. Laŭ la raporto montriĝis ke la estraro dum tiu tempo provis aktivigi la klubojn per diversaj entreprenoj, inter alie pri «Agado librojn». La opinio estis ke la kluboj admonu ke la oficialaj bibliotekoj aĉeti esperant-

ajn librojn. La rezulto de tiu ĉi agado ne estis bona bedaŭrinde. La esperantaj renkontoj sur Haukeli-montaro aŭtune 1972—73 estis tre bonsukcesaj kun ĉ. 50 partoprenantoj ĉiufoje. La kalkulaĵon laŭtlegis Olav Andersen. Aprobata kun kelkaj rimarkoj.

Elektio. La lastaj 2 jaroj Sauda Esperantoklubb havis la estraron. Por la venontaj 2 jaroj estos la klubo de Haugesund. Oni decidis ke tiu klubo mem elektu la estraron novan pli malfrue.

Eventualaĵo. Ni decidis ke ni ankaŭ venontan aŭtunon aranĝos Esperantan kunvenon sur Haukeli-monto. Elna Matland opiniis ke la nova estraro devos havi la tutan aranĝon. Per voĉdonado ni tion aprobis.

Kampanjo Reisæther. Laŭ propono de Elna Matland ni decidis elpagon de kr. 300 al tiu ĉi celo. Poste Johan Matland parolis pri «Informacio kaj instruado». Li inter alie opiniis ke la informacio estas tro malamplaksa (malgranda). — Post la parolado li laŭtlegis 2 rezoluciojn:

1. Al N.R.K. pri peto komenci Esperantajn kursojn en radio kaj en TV.
2. Al Kirke- og Undervisningsdepartementet pri admono fari ampleksan instruprogramon en Esperanto

kaj spirego de ĉi tiuj dioj de la arĝentaj trakoj estas nun historio. Kelkajn oni povas ankoraŭ ekvidi sur la trakoj de iuj el la transportmuzeoj, aliaj estas konservataj ĉe la Nov-Zelandaj fervojaj societoj. Oni povas ankaŭ trovi kelkajn lokigitaj ĉe la plej historiaj fervojaj lokoj, ekz. en Taŭmaruni kaj Christchurch. La rest-

on oni refandis, escepte de kelkaj, kiuj estas troveblaj kelkloke, kaŝitaj de longa herbaĉo kie ili iom post iom rustiĝas. Forpasis la tempo kiam la vaporo estis la reĝo, sed memorsignojn oni povas trovi en ekskurslokoj, en transportmuzeoj kaj en lokoj kie la dioj de la vaporo naskiĝis.

por instruistoj. Ambaŭ rezolucioj estis unuanime aprobitaj.

La kunsido daŭris ĝis la 12a horo. Poste la partoprenantoj faris piediradon en la bela ĉirkaŭaĵo, kaj inter alie ni vizitis tre interesan muzeon enhavantan tre malnovajn norvegajn objektojn. Posedanto nia gasteja mastro. — Je la 14a horo lunĉo, tre bona, kaj poste ni ĉiuj reveturis hejmen. La vetero ne estis la plej bela, sed tiel estas la kunvena loko.

Sekr.

KLUBO ESPERANTISTA EN OSLO

22/4. Post bonvenigo de la prezid. Ludvig Anjer montris lumbildojn de la ĉijara kongresurbo Hamburgo, kaj dum ni (pere de ili) rigardis la grandiozan kongresejon kaj la multajn, vidindajn lokojn en la urbo kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo, ni aŭskultis, pere de sonbendo, al interesa klarigo farita de L.K.K.-anoj. La klarigo estis akompanata de bela, tipe germana muziko.

Poste Otto Prytz atentigis pri la esperantaj elsendoj de Radio Vieno kaj Radio Varsovio, kaj la prezidanto referis inviton al la jarkunveno de Okcidenta Distrikto, kiu okazos 25/5 — 26/5 1974 en Lofthus, Ullensvang.

Libroj vendiĝis por 239,25 kr.

Raportis O. K.

7/5. Post bonvenigo de la prezid. Tom Arbo Høeg paroletis pri «La leĝaro de Magnus Lagabøter». Li estis reĝo de 1264 ĝis 1280, kaj li faris plurajn leĝojn. La paroletanto aparte klarigis pri la fontoj kaj la posta evoluo de unu el ili, nome: «La regna — landa, kamparana — leĝo de 1274». Tom Arbo Høeg finis sian paroleton

kun esprimo pri tio, ke estus dezirinde ke partoj de ĉi tiu leĝo estu tradukita en Esperanto.

Otto Prytz per kelkaj vortoj, al kiuj la ĉeestantoj starante aŭskultis, memorigis la mortintan ŝtatprezidanton de Aŭstrujo, Franz Jonas, kiu ja estis aktiva esperantisto, kaj ni honorigis lian memoron per unuminuta silento. — Fine la prezidanto donis kelkajn informojn pri la esperantaj elsendoj el Pola Radio.

Vendiĝis libroj por 100 kr.

Raportis O. K.

20/5. Post bonvenigo de la prezid. kaj diskuto pri alveno de aŭstraliaj gesamideanoj al Oslo, John Berggreen, dum 10-minuta lingvoinstruado klarigis pri la ĝusta aplikado de la prefiksoj mal-, ne- kaj sen-.

La usona esperantisto W. Harmon, kiu nuntempe loĝas en Tokio, ĉeestis la klubkunvenon. Li pere de sonbendo transdonis salutojn de japanaj esperantistoj, kiuj okaze de lia forvojaĝo al Eŭropo estis kolektitaj en lia hejmo. Li ankaŭ transdonis saluton de sia edzino, kiu ankaŭ estas esperantisto, kaj, kvankam ŝi akompanas lin dum la vojaĝo, ne havis okazon ĉeesti la kunvenon.

Pri la cirkulero, kiu estas sendita al i. a. la registaro, la parlamento, la partioj kaj al diversaj organizaĵoj, kaj kiu temas i. a. la celo de la Esperantomovado kaj pri tio, ke oni planas konferencon pri la lingva problemo en la mondo, klarigis J. Berggreen, kaj C. Støp-Bowitz referis cirkuleron de N.E.L. i. a. pri novaj kursoj.

Vendiĝis libroj por 129 kr.

Raportis O. K.

Akademia noto

La Akademio, konsiderante, ke la Lingva Komitato, kiam ĝi en 1922 malkonsilis la endukon de la sufikso -io por formi landnomojn, bazis sian decidon sur la konstato de la tiama uzado;

konstatante, ke nuntempe, malgraŭ tiu oficiala malkonsilo, la uzado de tiu sufikso -io ne malkreskis, sed male disvastiĝis;

memorante la vojon, indikitan de Zamenhof en la Antaŭparolo al la Fundamento por ebligi senrompan evoluon de la lingvo, kaj konsistantan en la propono de formo nova, uzbla paralele kun la malnova formo;

opinias, ke la okazo de la sufikso -io apud la fundamenta -ujo por ricevi pli internaciajn formojn de landnomoj estas ĝusta apliko de tiu Zamenhova uzado;

kaj, nuligante la antaŭan malkonsilon de la Lingva Komitato, sed ne ŝanĝante ĝin al rekomendo, lasas al la ĝenerala uzado libere decidi pri la venko de la pli oportuna formo.

Konkurso

La Grupo Esperantista de Alicante, Str. Onesimo Redondo 23, Alicante, Hispanujo, invitas al internacia konkurso pri verkado de fabeloj. Oni povas sendi la verkojn (originalajn aŭ tradukitajn) dum la tuta jaro 1974, kaj dum februaro 1975 oni aljuĝos kvar premiojn. La fabeloj ampleksu minimume 4, maksimume 6 paĝojn, tajpitajn.

Literaturkonkurso

Internacia Literaturkonkurso Pecenum por poezio (adr.: Piazza Benvenuto Stracca 4, I-60100 Ancona, Italujo) aljuĝas premiojn en la branĉoj originala poezio kaj tradukita poezio, alsendataj en 6 tajpitaj ekzempleroj, el kiuj unu portu subskribon, la aliaj 5 restu anonimaj.

Anonco

Ni multobligos novajn listojn de la sonbendamikoj de la tuta mondo, kaj petas, ke sonbendamikoj sendu detalojn al ni pri magnetofonoj, ĉefintereso k.t.p. laŭeble baldaŭ. La novajn listojn ni volonte sendos kontraŭ respondkuponon.

SONBENDAMIKOJ, G. Stephenson, 2 Shagbrook Cottages, Buckland Road, Reigate, Surrey RH2 9RE, Britujo.

Alvoko

Nia Esperanto-societo antaŭvidis en sia laborplano ĉi-jara starigi kontaktojn kun Esperanto-societoj de via lando. Ni bone scias ke norvega popolo tiel malavare helpis niajn internigitojn, kiujn faŝistoj forveturigis tien.

Ni volas kontribui al plilarĝigado kaj plifortigado de amikeco inter niaj du popolsocioj. Esperanto estas plej efika por tio.

Norvegaj Esperantokluboj bonvolu skribi al: Esperanto-Societo «Marko Neŝić», Poŝtfako 184, Zmaj-Jovina 4, YU-21001 NOVI SAD, Jugoslavio.

NI PREZENTAS:

SKOLTA ESPERANTO LIGO

Sekretario: J. K. Hammer, Zaandam, Nederlando
 Prezidanto: John Berggreen, Oslo. — Honoraj prezidantoj:
 A. W. Thomson, N. Booth, D. H. Davis, L. J. Van Gulck
 Kasisto: D. H. Withey, Liverpool, Anglujo
 Redaktoro de «La Skolta Mondo»: H. A. Rosbach, Kr.sund
 Membroj de la Centra Komitato: S. Tella, Finnlando,
 S. Seitara, Japanujo.



Dum la unua mondmilito angla flegisto kiu laboris en la francaj bataltranĉeoj ekhavis la ideon, ke la skolta kaj la interlingva movadoj devus «ĝemeliĝi». Lia nomo estis Alexander William Thomson. Kaj jen li, sur la batakkampo, verkis libreton pri tio. Tio estis la kreo de Skolta Esperanto Ligo, S. E. L. La dua membro estis angla soldato el Egiptujo, John Leslie, poste enskribiĝis Norman Booth, Douglas Davis — kaj iom post iom multaj aliaj.

La laborkampo estis — kaj daŭre estas — vasta. Nun pluraj milionoj da geknaboj apartenas al la geskolta



Interpretista
insigno

movado, kaj tiuj sin sentas gefratoj, celas mondan kompreniĝon — kaj mankas la naturan helpilon, la Internacian Lingvon.

La fondinto de skoltismo, lordo Baden-Powell, mem montris al Esperanto en la unua eldono de «Scouting for Boys», sed, bedaŭrinde, lia reko-

mendo malaperis el postaj eldonoj. Baden-Powell ankaŭ persone permesis, ke skoltoj sur la uniformo rajtu porti insignon «Esperanto Parolata», i. a. dum la ĵamboreo en Londono. Kaj la laboro progresis: Naciaj skoltasocioj oficiale agnoskis la lingvon, kaj oni havis veran sukceson en Gödöllő en Hungarujo. Tamen la Internacia Skolta Officejo poste, en 1934, rezoluciis «ne rekomendi la studadon de Esperanto fare de skoltoj, ĉar ĝi ne havas praktikan valoron». Kaj tiu blinda sinteno daŭris ĝis 1957, kiam la nova direktoro montris favoron. Kaj nun, iom post iom, la glacio degelas. En 1964 la rezolucio el 1934 estis nuligata, kaj en 1968 la Ligo ricevis proponon uzi Esperanton kiel duan lingvon dum la 6-a Internacia Ĵamboreo en Essex. Tiel Esperanto ankaŭ estis permesata dum la Mondĵamboreo en Tokio — kaj oni esperas je sukceso dum la venonta somero, en Mondĵamb 75, kiu okazos en Norvegujo.

Sed SEL ne havas multajn membrojn en nia lando. 22 skoltoj — nunaj kaj pli fruaj — pagis kotizon al la landa sekcio. Kaj se oni komparas la membroliston kun tiu de esperanto-

grupoj en Norvegujo, montriĝas, ke nur 4 lokoj kun esperantoklubo reprezentiĝas sur la membrolisto: Bergen, Oslo, Skien kaj Trondheim.

Ĉu ne estas skoltoj en la aliaj urboj kaj lokoj? — Jes, certe. Sed pli verŝajne la esperantistoj ne scias, kion proponi al la skoltoj. Tamen tio devus esti ne tro malfacila. La skoltoj



Mondfrateca
insigno

havas sistemon de insignoj, kiuj montras povojn kaj sciojn de la skolto. Inter tiuj estas Interpretista insigno, kiu postulas lingvan konon, Mondfrateca insigno, kiu postulas regulan kontakton kun eksterlanda skolto dum minimume unu jaro, propran Esperanto-insignon k.t.p. Simpla propono pri helpo al tio povus esti la pordo al multaj junaj novuloj en la esperantoklubo.

Jam menciite: La Ligo havas sian propran gazeton. Tiu — «La Skolta Mondo» — aperas 4-foje en la jaro, kaj enhavas multajn interesajn artikolojn. Specialan atenton vekis la serio «Skolta Scienco», kiu montras simplajn eksperimentojn kiujn ĉiu skolto povas fari por studi la naturon. La gazeto estas ofsetita, kaj tial povas havi multajn bildojn. Kaj la gazeto estas vere internacia — kun artikoloj el multaj landoj kaj abonantoj tra la tuta mondo. SEL havas reprezentantojn en pluraj landoj kaj membrojn en pliaj. La kotizo estas tre malalta (10,- kr.) kaj inkluzivas la abonon, kaj pro tio subtenantaj

La 43a internacia feria kurso en Helsinger

okazis ĉijare la 21.—27. de julio kun ĉ. 130 partoprenantoj el 17 diversaj landoj, interalie Aŭstralujo kaj Koreujo El Norvegujo venis s.ino Rifling, s.ino Bugge-Paulsen kaj mi mem. Precipe Danujo, Svedujo, Finnlando, Germanujo, Nederlando kaj Usono estis bone reprezentitaj. — Unu de la usonaj kursaninoj sciigis, ke la Esperantismo en ŝia lando nun montras klaran progreson!

La programo estis plenega, bona kaj interesa, kaj oni neniam havis multan tempon por enuiĝi.

La horoj de instruado antaŭtagmeze foriris rapide. Mi partoprenis en la konversacia kurso. La instruado estis amuze gvidita de s.ino Tove Bak kaj s.oro Povl Jørgensen, parte per la tabulo, parte en malgrandaj grupoj. Ni ricevis diversajn taskojn por solvi, kio kaŭzis viglan babiladon en ĉiuj grupoj.

La unuan posttagmezon s.oro Friis rakontis pri la historio de la feriaj kursoj kaj la altlernejo. En aliaj tagoj la kursanoj vizitis la kastelojn Kronborg, Fredensborg kaj Fredriksborg. Lastnoma kastelo estas ankaŭ eminenta muzeo, kaj tie s.oro Moravec en sia vigla kaj interesa maniero rakontis pri la arkitekturo kaj pentraĵoj.

Lundon vespere (22/7) s.ino Jonas membroj estas tre bonvenaj. La Ligo eldonis propran esperantokurson, La ĵamborea lingvo, kiu speciale celas la skoltojn.

Ro.

Korespondu!

son el Stockholm rakontis pri Ĉeĥoslovakujo. Ĉi tiu lando ne havas bordon al la maro, sed anstataŭe ĝi havas muzikon. Kaj poste ni vidis belajn lumbildojn al la sonoj de Dvorák kaj Smetana. Mardon vespere s.ino Tove Bak montris interesajn lumbildojn de vojaĝo en Islando. Post tio la islandaj kursanoj respondis al diversaj demandoj pri ĉi tiu insulo de sagao.

Jaŭde, post la instruado kaj lunĉo, ni prenis la ŝipon al Helsingborg, kie ni estis gastoj de la loka Esperantoklubo. Unue ni veturis per aŭtobuso en kaj ekster Helsingborg. Vespere ni ĉiuj kunvenis kaj festis kune kun la svedaj gesamideanoj en ilia loka klub-kunvenejo «Kärnpunkten». Tie, post la manĝaĵo, oni salutis de diversaj landoj, kaj s.ino Bugge-Paulsen transdonis saluton de la norvegaj gastoj. Fine la svedoj esperantistoj estis invititaj al nia finfesto la sekvantan tagon. Poste ni revenis per ŝipo al Helsingør en iomete malvarma sed bela vetero kun lunbrilo.

Vendred-vespere: Finfesto en la ĉambrego de prelego kun kantoj kaj muziko. Multaj kursanoj faris sian propran parton de la programo, i. a. kun amuzaj skeĉoj. Inter tiuj ni kune kantis multajn kantojn. Mi miris pri tio, ke la esperantaj kantoj ĉiam sonas tiel klaraj kaj melodiaj. Ankoraŭ avantaĝo de la Esperanta lingvo !!

Vera sukcesa kurso!

W. Gjertsen.

* * *

Ŝipkapitano sur la Nigra Maro dez. kor. Interesoj: poŝtmarkoj, bildkartoj, geografio, historio, ŝipoj k. t. p.; interŝanĝas poŝtmarkojn, revuojn, librojn, katalogojn, prospektojn. Mia adreso estas: Kurguzov Vladimir, ul. Sverdlova 2 kv. 14, JALTA 334200, Krimeo, Sovet-Unio.

17-jara lernanto de supera lernejo dez. kor. kun amiko aŭ amikino el Norvegujo. Mi interesiĝas pri kino, sporto, muziko k. a., kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn kaj gramofondiskojn. Klaus-Dieter Beinert, DDR-943 Schwarzenberg, Kratzbeersteig 2, DDR.

NORSK ESPERANTO-FORBUND (Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100 30
Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo:

Boks 942, Oslo. Postgiro 100 32

ESPERANTOFORLAGET A/S (Eldonejo Esperanto A/S)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100 31
Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 1 33 29

La redakcio:

Hans Amund Rosbach, Nergt. 37 c,
6500 Kristiansund N. Telefon: 77 6 20

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:

Boks 942, Oslo 1